
# *Eksterordinara pintkunsido de ALBA-TCP kunlaboros kontra? la epidemio de ebolo.*




La membro-landoj de la Bolivara Alianco por la popoloj de nia Ameriko-Traktato de Komerco de la popoloj (ALBA-TCP) okazigos en Havano eksterordinaran pintkunsidon por kunordigi la kunlaboron kontra? la epidemio de ebolo, informis la kuba ministerio pri eksteraj rilatoj.

La kunsido okazos la 20-an de oktobro kaj celas kunordigi la regionan kunlaboron por preventi kaj alfronti tiun malsanon.

La pintkunsidon ?eestos ?tatestroj kaj prezidentoj samkiel altrangaj reprezentantoj de la membro-landoj, organizo formita de Venezuelo, Kubo, Bolivio, Nikaragvo, Ekvadoro, Dominiko, Sankta Vicento  kaj Grenadinoj, Antikvo kaj Barbudo kaj Sankta Lucio.

Anka? partoprenos reprezentantoj de internaciaj organizoj, la? oficiala informo, kaj oni difinos  la kontribuon komunuman fronte al tiu ?i grava sanitara defio por preventi kaj eviti la propagadon de tiu malsano al la regiono de Latinameriko kaj Karibio.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/36696-eksterordinara-pintkunsido-de-alba-tcp-kunlaboros-kontrau-la-epidemio-de-ebolo

**Radio Habana Cuba**